

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 2

Marto/Aprilo 1966

NIAJ FIDELAJ VETERANOJ

Esplorante la komercan propagandon en gazetoj, revuoj, afiŝoj kaj televido oni povas veni al la impresoj, ke nur la juna generacio destinas nian nuntempan vivoritmon. Tiu impresoj estas malpli forta en Esperantujo, ĉar ofte mankas tie la juna elemento, se oni ne konsideras la fortan junularan movadon en kelkaj landoj.

Ankaŭ en nia asocio regas la pli aĝa generacio. Parte estas gekolegoj, kiuj kontaktiĝis kun Esperanto post la milito, parte ekzistas ankoraŭ gekolegoj ofte jam pensumitaj, kiuj esperantistiĝis antaŭ kvardek aŭ ĉe kvindek jaroj. Por kompletigi la historion de nia asocio, la estraro de GEFA decidis antaŭ 1½ jaroj intervjui per sonbendo tiujn personojn pri interesaj eventoj kaj spertoj.

La demandado de la veteranoj ankoraŭ ne estas finita. Tamen la ĝisnunaj rezultatoj jam donas multajn, parte surprizajn klarigojn. Komuna al ĉiuj intervjuitoj estas ilia fidela sinteno, de kiam ili okupiĝas pri Esperanto. Ofte ili estis la solaj, kiuj finis kurson por komencantoj. Sen subteno de la fervoja administracio kaj sen oficiala agado de la Fervoja Socialorganizo kiel nun ili agadis. Tamen la periodo inter la jaroj 1920 ĝis 1934 estas taksata de ili kiel la plej bela kaj fruktedona en la esperantista vivo. Eble la veteranoj glorifigas tiun periodon rememorante pri la tiamaĵ sukcesoj. La interna ideo pluevoluis. La sennaciismo kaptis multajn interesulojn. Novaj esperantistoj aliĝis sub pli favoraj cirkonstancoj ol nun.

La hitlera reĝimo likvidis la Esperanto-movadon. Nur malmultaj kontaktoj estis ankoraŭ eblaj. Renkontoj kun eksterlandaj esperantistoj dum la milito estis hazardaj. Post 1945 la hodiaŭaj veteranoj refondis la Esperanto-movadon. Ne ĉiuj estis pretaj por kunlabori pro personaj zorgoj dum la tristaj jaroj. La sopiro pri paco kaj interkompreniĝo post longjara izoligo gajnis novajn adeptojn por la Internacia Lingvo.

Eble tiu aŭ alia veterano ne estis tute kontenta pri la laboro en la kadro de la Fervoja Socialorganizo. Oni devis ekkoni, ke la problemoj de Internacia Lingvo estas pli komplika, pli subtila kaj ankaŭ pli politika ol tridek jarojn antaŭe. Tamen ĉiuj intervjuitaj veteranoj deklaris unuanime, ke ili neniam bedaŭris sian poresperantan agadon kaj povas rekomendi plenkonscie al la junularo okupiĝi pri Esperanto.

Tiu entute pozitiva sinteno certe akcelos la pli junajn samideanojn. Sendube ĝi manifestiĝos ankaŭ en grandnombra partopreno al la 19a IFEF-kongreso okazonta 1967 en Fulda. Tie, en la agrabla sfero de mezgranda kaj favore situanta urbo, ankaŭ niaj veteranoj povos ĝui la specifan sferon de internacia fervojista kongreso sen la devigo vojaĝi eksterlanden. Ilin kaj iliajn familianojn atendos kaj bonvenigos la Loka Kongresa Komitato.

Do, veteranoj kaj pensiuloj, venu multnombre al Fulda en majo 1967!

W. B.

Notu bone:

18a IFEF-Kongreso en Utreĥt
14a — 20a de majo 1966

51a UE-Kongreso en Budapeŝt
31a de julio — 6a de aŭgusto 1966

10a GEFA-Jarkunveno en Uelzen
15a — 16a de oktobro 1966

19a IFEF-Kongreso en Fulda
6a — 12 de majo 1967

Aperis la longtempe atendita broŝurita

FERVOJA TERMINARETO

Kleines Eisenbahn-Fachwörterbuch
Deutsch/Esperanto — Esperanto/Deutsch
de Gernot Ritterspach

formato: 11,4 × 16,2 cm

2000 fakterminoj

Eldonanto:

Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), 6 Frankfurt (Main), Karlstr. 4—6

Mendu tuj

ĉe la sekretariejo de GEFA

aŭ rekte ĉe „s-ino Elisabeth Ritterspach, 607 Langen, Berliner Allee, Germanio“

uzante ŝian poŝtĉekan konton numeron 276531 Frankfurt (Main)

Prezo: 6,50 DM (gm) + 10% por afranko kaj pakumo

Laŭkvanta rabato ek de 10 ekzempleroj

GLUMARKOJ

por la 19a IFEF-Kongreso 1967 en Fulda ĵus eldoniĝis.

Per tiuj dukoloraj reklamiloj vi povas propagandi efikplene. Por Esperanto, Por IFEF. Por la kongresurbo.

Unu folio kun 25 glumarkoj kostas 1.— DM (gm) plus 0,20 DM (gm) por afranko. Ne necesas antaŭpagi la afrankon por sendaĵoj al fervoja deĵoradreso.

Mendu tuj per deĵorletero ĉe „BHS Jentsch, MA Darmstadt“ aŭ perpoŝte ĉe „19a IFEF-Kongreso, 6 Frankfurt (Main) 701 poŝtfolio 700746“. La glumarkoj estos forsendataj post la alveno de la necesa sumo sur la kontonnumero 50051 de la Eisenbahn-Spar- und Darlehenskasse Frankfurt (Main) aŭ ties poŝtĉekkonto n-ro 56908 Frankfurt (Main) kun la indiko „19a IFEF-Kongreso“

ESPERANTO-STRATO

La bavara urbo Weiden (Oberpfalz) ankaŭ posedas „Esperanto-straton“. La nomigon stimulis kolego König, estro de la grupo Weiden kaj komisiito por Esperanto en la distrikto Regensburg.

GEFA kore gratulas.

Nova bilettipo

La trafikentreprenoj de Londono esploras nuntempe la enkondukon de nova bilettipo por la subtera fervojo. Ili bazas sur spertoj rezultintaj el la enkonduko de aŭtomata biletteldonejo.

De januaro 1964 ekfunkcias en kelkaj subteraj stacioj de okcidenta Londono provizore aŭtomataj bariloj, kiuj „legas“ elektronike la biletojn de la pasaĝeroj kaj permesas la ĉeeston sur la kajo nur post tiu aŭtomata kontrolo. La elektronike „legeblaj“ biletoj portis ĝis nun surpruson el magneta inko.

La subtera fervojo staras nun antaŭ la transiro al nova etapo. Estas projektite enkonduki bileton, kiu sur unu flanko — kvazaŭ kiel registrobendo — estas kovrita per bruna, magneta oksido kaj ricevas „kodon“ antaŭ la ellivero. Nuntempe la nova biletspeco estas ekzamenata en laboratorioj. Poste estos kamparataj la spertoj, kiuj rezultas el la uzado de ambaŭ bilettipoj.

La esploroj de la subtera fervojo „London Transport“ celas la enkondukon de tute nova sistemo de biletteldonejo. Se tiu projekto sukcesos, multe da personaro estos ŝparata. Ankaŭ la nombro de senbiletaj pasaĝeroj kredeble regresos. Entute la kontrolsistemo evidente simpliĝos.

Komp. de W. B.

Panorama

Baugé. In einer der traditionsreichsten und schönsten Landschaften Frankreichs lädt das im Besitz französischer Esperantisten befindliche Schloß Grésillon zu kulturellem und erholsamem Aufenthalt ein. Allein seit 1962 trafen sich dort 6000 Esperantisten aus 30 Ländern, um an Vorträgen, Filmvorführungen, Sprachkursen und -prüfungen, Ausflügen und Ausstellungen teilzunehmen.

Brüssel. Im protestantischen Afrika-Heim begann am 15. Januar 1966 ein Esperanto-Kursus für afrikanische Studenten aus dem Kongo.

Budapest. Der Rundfunksender Budapest nahm am 1. Februar 1966 Sendungen in Esperanto auf. Sendezeit täglich von 20.30 bis 20.45 Uhr auf Mittelwelle (240 m) und Kurzwelle (41,6 und 48,1 m). — Bedeutende olympische Sportler aus Ungarn schlugen am 30. Januar 1966 dem Olympischen Komitee die Einführung des Esperanto vor.

Frankfurt. Die „Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten“ beginnt im Mai mit der Auslieferung der Eisenbahn-Fachwörterbuchs deutsch-esperanto und umgekehrt. Die etwa 2000 Fachausdrücke betreffen den technischen und nichttechnischen Eisenbahndienst. Die Übersetzungen wurden von einer internationalen Kommission ausgewählt, die als Arbeitsgrundlage das mehrsprachige Eisenbahn-Fachwörterbuch des Internationalen Eisenbahn-Verbandes (UIC) benutzte. Die Arbeit am Wörterbuch liegt in den Händen des

Sprachfreundes Gernot Ritter-spach und seiner Gattin.

Fulda. Die angelaufenen Vorbereitungen für den 19. IFEF-Kongreß im Mai 1967 waren schon mehrmals Gegenstand von Veröffentlichungen in der Lokalpresse. Die Stadtverwaltung Fulda erklärte sich inzwischen bereit, für den deutschsprachigen Stadtprospekt eine Einlage in Esperanto herauszugeben.

Krimml. Die österreichischen Eisenbahner-Esperantisten veranstalteten vom 19. Februar bis 5. März 1966 ihre schon traditionellen internationalen Ski-Wochen. Unter den 60 meist jugendlichen Teilnehmern befanden sich 22 Deutsche, die das reichhaltige Programm mit großer Begeisterung miterlebten.

Nürnberg. Die Unterschriftenaktion des Welt-Esperanto-bundes an die Vereinten Nationen wird noch bis zum 31. Juli 1966 fortgesetzt. Bis zum 31. Dezember 1965 registrierte die Hauptgeschäftsstelle des Deutschen Esperanto-Bundes 44400 Einzelunterschriften und die Kollektivunterschriften von 96 Vereinen und Organen mit 6210990 Mitgliedern.

Zu einem Esperanto-Forum am 5. März 1966 im Festsaal des Verkehrsmuseums lud das Bundesbahnsozialwerk — Esperantogruppe Nürnberg — zusammen mit der Stadtgruppe ein. Vor 60 aufmerksamen Zuhörern sprachen erfahrene Esperantisten, darunter Dr. Herrmann, der Vorsitzende des Deutschen Esperanto-Bundes, über das The-

ma „Esperanto — Notwendigkeit oder Wunschtraum“, ferner über die Internationale Sprache in Verkehr, Handel, Industrie und in den Schulen. Der Abend erhielt durch heitere Beiträge des Vortragskünstlers Starke eine besondere Note. Die Presse nahm lebhaften Anteil.

Rom. Die katholischen Esperantisten Roms halten monatlich einmal einen besonderen Gottesdienst ab. Am 21. November 1965 predigte der damals in Rom weilende Konzilsvater Bischof Pichler (Jugoslawien) in Esperanto.

Schwelm. Als einer der wenigen Eisenbahner-Esperantisten nahm der Sprachfreund Heinz Schindler aus Schwelm im Sommer 1965 am 50. Kongreß des Esperanto-Weltbundes in Tokio teil. Über seine zahlreichen Erlebnisse erschien am 29. Januar 1966 in der „Schwelmener Zeitung“ ein ausführlicher, illustrierter Bericht, in dem auch die Tokaido-Schnellbahn, die derzeit schnellste Eisenbahn der Welt, gewürdigt wurde.

Wien. Der Rundfunksender Wien II hat im November 1965 die 1000. Sendung in Esperanto verbreitet.

Wuppertal. Die vielfältigen Bemühungen, unter den bei der DB tätigen Gastarbeitern Interessenten für einen Esperanto-Kursus zu finden, blieben leider ohne Erfolg.

W. B.

**Nicht vergessen:
Die Unterschriftenaktion
läuft noch bis 31. Juli 1966.**

Ni legis en . . .

Am Schienenstrang (Nr. 3/66): „Freiheit, Freizeit, Freude“, eine anregende und ungewöhnliche Darstellung der BSW-Großveranstaltung in Hamburg am 11. September 1965 mit besonderer Beachtung der Eisenbahner-Esperantisten.

Aŭstria Esperanto-Revuo (n-ro 1/66): Konkreta alvoko de la asocia prezidanto.

BULGARA ESPERANTISTO (n-ro 1/66): „Ni persistu“, komparo inter antaŭe ne imageblaj inventoj kaj Esperanto.

Bulteno de la Aŭstria Sekcio de IFEF (n-ro 1/66): „Ni persistu“, komparo inter antaŭe ne imageblaj inventoj kaj Esperanto.

DEFA-BULTENO, membra organo de Dana Esperantista Fervoja Asocio (n-ro 3/66): Programo de la DEFA-jarkunveno en Odense.

ENROPĀUS (Nr. 25): Mutige Stellungnahme zum differenzierten Problem eines Vereinten Europas.

Esperanto en Skotlando (n-ro 61): „Nia afero antaŭ la publiko“, trarigado pri la federacia agado.

FERVOJISTO, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda (n-ro 2/66): Priskribo de modernaj TEE-trajnoj.

FRANCA ESPERANTISTO (n-ro 235): Detaloj pri la 58a nacia kongreso en Marmande.

HUNGARA FERVOJISTA MONDO (n-ro 3/4/56): „La fervojo en Hindio“, malmulte konataj karakterizaĵoj.

INFORMILO de la Internacia Esperanto Muzeo en Vien (febr.): Nuntempa volumo de la librostoko estas 12 431.

ITALA FERVOJISTO (jan.): Pilgrimvojaĝo al la Sankta Lando.

JEN, bulteno de la Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj (jan.): Inaŭguro de la nova restoracio „La verda stelo“ en Hanley.

Jugoslavia Fervojisto (n-ro 5/6/65): „Estonteco de la fervojo“, interesa teknika temo.

La Fervojisto, organo de „la Franca IFEF-sekcio (n-ro 212): „Esperanto kaj neutraleco“, diskutinda problemo.

LANTERNO (n-ro 4): Tiklaj politikaj temoj precipe pri komunistaj landoj.

La vie du rail (n-ro 1021): Dupaĝa artikolo pri la lastjara IFEF-kongreso en Norvegio kun kolorfotoj.

Svisa Esperantisto (n-ro 40): Protokolo de la ĝenerala kunveno de SAEF en Aarau la 5an de februaro 1966.

THE WORKER ESPERANTIST, organo de la brita laboristaro (n-ro 177): Informoj pri la SATEB-jarkunveno en Leamington.

ANONCOJ

La Svisa Esperanto-Kalendaro por 1967 jam nun povas esti mendata. La tekstoj estos du-lingvaj: esperantaj kaj germanaj. Favorprezo ĝis fine de aprilo 1966 estas 4,50 svisaj frankoj inkl. afranko, poste 5,50 svisaj frankoj. Mendojn akceptas: Karl-Heinz Mischler, Franklinstr. 29, **CH-8050 Zürich**, Svislando.

La plej granda trafikmuzeo en Eŭropo, la svisa trafikmuzeo en Luzern, uzas ekde 1966 en sia prospekto ankaŭ Esperanton. Mendu la koloran faldfolion senkoste ĉe: Svisa Trafik-Domo, Lidostr. 5, **CH-6000 Luzern**, Svislando.

„Eŭropa Feria Semajno“ okazos denove en Svislando de la 4a ĝis la 10a de Septembro 1966 sur la montera Boldern apud Männedorf ĉe la lago de Zuriko. Kostoj por pensiono kaj ekskursoj: 170.— svisaj frankoj. Limdato por aliĝo: 15a de aŭgusto. Pluaj informoj per „S-ro Hans Hunkeler, poŝtfako 417 CH-5001 Aarau, Svislando“.

La Norvega Ŝtata Fervojo eldonis du esperantlingvajn faldfoliojn, kiuj meritas ĝeneralan atenton pro sia eleganta aspekto kaj enhavo.

„Veturo kun ĝojo per Norvega Ŝtata Fervojo“

„Vizitu la fervojmuzeon Hamar“

La faldprospektoj estas senkoste haveblaj per: Norges Statsbaner, Presse-og, Opplysningskontor, Storgate 33, **Oslo**, Norvegio.

Ankaŭ Hispana uzas Esperanton por la turismo. Eldoniĝis la broŝuro „Hispanio por vi“, senkoste havebla ĉe „Subsecretaria de Turismo, Sección de Esperanto, Madrid, Hispanio.“

Korespondadon deziras desegnistoj „s-ro Ljuben Tabakov, Letniska 27, **Orehovo**, Bulgario“.

Korespondadon deziras 23jara fervojisto „s-ro Rostislav Kovár, p. Česká Trebová 3, **Lhotka ĉ. 30**, Ĉeĥoslovakio.

Korespondadon, interŝanĝon de insignoj, nacilingvaj gazetoj, esperantaĵoj, glumarkoj kaj etiketoj deziras „s-ro Friedrich Zöld, teknikisto, ul. Vystavby 1, **Kosice**, Ĉeĥoslovakio“.

Internaciaj feriotagoj okazos de la 26a ĝis la 30a de julio 1966 en Klosterneuburg proksime al Vien. La kompleta programo estas havebla ĉe: Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16, **A-1150 Wien**, Aŭstrio. Tie estas haveblaj ankaŭ allogaj restaĵoj el la Europa Esperanto-Konferenco 1965, i. a. buŝtukoj, poŝtkartoj, portujoj. (La redakcio disponigos volonte la kompletan liston)

Okaze de la 700 jara jubileo la sveda urbo Örebro adonis plurkdoloran faldfolion. La turisma prospekto estas senkoste havebla per „Turistbyrån, Gamla Teatern, Storgaten 1, Örebro, Svedio“.

Berichtigung

Im BULTENO Nr. 1/1966 ist auf der 4. Seite bei „Bezirksbeauftragte“ zu berichtigen:

Köln: Basa 943/882/75/384 oder 106

Mainz: Basa 954/865/53

Saarbrücken: Basa 956/5558